

Memorinda Eldono



Majo/Junio/Julio - 2006

# Oomoto

INTERNACIA

**La Reenkarniĝo de la  
sopirata gazeto  
"Oomoto Internacia"**

**La 1-a datreveno de  
*Oomoto Internacia***

**Aktivas la Kvina  
Spirita Gvidantino  
de Oomoto**

*Olga  
Palmas*

**Diaj Revelacioj 03**

Revelações Divinas **03**

**La fondo de la gazeto "Oomoto Internacia" 04**

Fundação do órgão "Oomoto Internacia" **05**

**Reenkarniĝis la sopirata organo "Oomoto Internacia" en Braziljo 06**

Reencarnou o saudoso veículo "Oomoto Internacia" em Brasília **07**

**La unua datreveno de Oomoto Internacia 08**

O primeiro aniversário da Oomoto Internacional **09**

**Delegito de UEA gratulas Oomoton 10**

Delegado da UEA parabeniza Oomoto **11**

**Aktivas la Kvina Spirita Gvidantino de Oomoto 12**

**Dia Deziro 14**

Desígnio de Deus **15**

**La nova domo de Oomoto 16**

A nova casa da Oomoto **16**

**Dia Lingvo 17**

Língua Divina **17**

**Ĉu Koincido? 18**

Coincidências? **19**

**Gratulojn al Oomoto pro la relanĉo de la revuo 20**

Parabéns à Oomoto pelo relançamento da revista **21**

**Ivo Lapenna: brila oratoro kaj talenta verkisto 22**

Ivo Lapenna, brilhante orador e talentoso escritor **23**

Kolofono / Expediente

**Editoro / Editor:**

MAEDA Shigeki

**Respondeca ĵurnalisto / Jornalista responsável:**

Emerson Werneck

**Redaktoro en esperanto / Redator em esperanto:**

MAEDA Shigeki

**Redaktoro en la portugala / Redator em português:**

Emerson Werneck

**Tradukistoj / Tradutores:**

Francisco Mattos de Oliveira, Ana Rosario Koide Kamey

**Paĝaranĝo / Diagramação:**

Midiax Agentejo (Agência Midiax)

**Ĉinumeraj kunlaborantoj / Colaboradores neste número:**

Eurípedes Barbosa, Walter Cardoso,

Therezinha Felix Cardoso,

Ursula Grattapaglia, HIROSE Jasumi,

José Carlos Dorini Ramos,

Benedicto Silva.

**Kovrilo / Capa:**

Elza Palmoj (Elza Pereira Ramos)

**Malantaŭa kovrilo / Contra capa:**  
pejzaĝo ĉirkaŭ la lago kinrukaj en  
la sankta ĝardeno de Oomoto, Ajabe.

**Eldono / Tiragem:**

2000

## **Diaj Revelacioj**

**Novjaron (lunan) en la 25-a jaro de Meĵji (1892)**

- 1. Ĉiuj mondoj samtempe disvolviĝas kiel umefloroj. Jen venis la tempo de Dio Uŝitora.**
- 2. Nun realiĝas Dia mondo, kiun Mi malfermis umeflore por daŭrigi pinkolore.**
- 3. La nuna mondo estas besta mondo, plena je nur diabloj, en kiu plifortaj perforte regas malplifortajn. Ankaŭ Japanio fariĝas besta.**
- 4. Se la mondo daŭros en la nuna stato, baldaŭ ĝi pereos. Pro tio Mi aperis por plenumi la malkonstruon kaj rekonstruon de ĉiuj mondoj. Ĉiu do sin pretigu. Ĉi tiun mondon Mi ĝisfunde renovigos.**
- 5. Plenuminte la grandajn lavadon kaj purigadon de la tri mondoj materia, obskura, kaj Dia, Mi pace regos la mondon kiel Dian, kiu daŭros por ĉiuj generacioj.**

## **Revelações Divinas**

**Primeiro dia (lunar) do ano 25 da Era Meiji (1892)**

- 1. Todos os mundos desabrocham simultaneamente como flores de ameixeira. Eis chegado o tempo do Deus Ushitora.**
- 2. Realiza-se agora o mundo divino, que Eu fiz abrir-se, qual uma flor de ameixeira, para perdurar com a cor do pinheiro.**
- 3. O mundo presente é um mundo bestial, repleto apenas de diabos, onde os mais fortes dominam pela violência os mais fracos. Também o Japão torna-se bestial.**
- 4. Se o mundo continuar neste estado, em breve perecerá. Por isso Eu Me manifestei para realizar a destruição e reconstrução de todos os mundos. Cada qual se prepare, pois. Eu farei uma profunda renovação deste mundo.**
- 5. Depois de realizar a grande lavagem e purificação dos três mundos - material, obscuro e Divino - Eu governá-lo-ei pacificamente como um mundo Divino, que durará por todas as gerações.**

## La fondo de la gazeto “Oomoto Internacia”

**HIROSE Jasumi**  
Prezidanto de Oomoto

Okaze de la fondo de la gazeto “Oomoto Internacia” mi elkore salutas.

Por realigi la mondon de Miroku (idealan socion), la 3an de februaro 1892, en la urbo Ajabe, prefektejo Kioto, Japanio, Oomoto naskiĝis tiel ke Fondintino DEGUĈI Nao ekricevis Diajn revelaciojn.

Alia fondinto (Kunfondinto) Majstro DEGUĈI Onisaburo asistis Fondintinon kaj, de oktobro 1921, komencis dikti la grandvolumenan verkon (sanktan skribon) “la Rakontoj el la Spirita Mondo” en 81 volumoj, por klarigi la revelaciojn, t.e. profetaĵojn kaj avertojn, kiujn Fondintino skribadis dum sia tuta vivo. Tiel li fondis la doktrinon de Oomoto kaj, samtempe, desegnis la vojmapon al la mondo Miroku.

Interalie, ŝajnas ke la tero de Sud-Ameriko havas profundan rilaton kun Dia plano: en “la Rakontoj el la Spirita Mondo” estis diktitaj la rakontoj sur la scenejo de Sud-Ameriko en la amplekso de kvar volumoj. Kaj, tio ke en decembro 2004, en Braziljo, la sankta metropolo de Brazilo en Sud-Ameriko, konstruita laŭ Dia profetaĵo, fondiĝis *Oomoto Internacia*, ne estis hazarda, sed okazis laŭ Dia plano, mi pensas. Do, mi esprimas elkoran dankon al ĉiuj koncernatoj pro la kompreno kaj varma subteno.

En junio 1923, Majstro DEGUĈI Onisaburo enkondukis en Oomoton la pacan lingvon “Esperanto” kaj samtempe antaŭenpuŝis la projekton por kunlabori kun diversaj religioj en la mondo, kaj en februaro 1924, transirante la maron, li celis Mongolion de Azio kaj plue Jerusalemon de Mezoriento, kun granda revo por realigi la mondpacon en la spirita-morala unueco.

La ambicia entrepreno celi Jerusalemon estis interrompita provizore, sed post kiam li revenis de Mongolio, en majo 1925, Majstro organizis en Pekino, Ĉinio, Mondan Religian Federon; poste, la 9an de junio, li fondis en Ajabe, la naskiĝloko de Oomoto, Universalan Homaman Asocion kun la lanĉita idealo “Universala Homamo” kaj “Ĉiuj religioj havas unu originon”. Jen tiel li komencis paŝi sur la vojo de internacia paca movado super ĉiuj muroj de rasoj, ŝtatoj, religioj k.a.

Post tio la movado por paco disvolviĝis vaste tra la mondo, ekzemple, en Azio, Eŭropo, Brazilo k.a., sed ĉi tio multe ekscitis la tiaman registaron de Japanio, paŝantan sur la vojo de militismo, kaj la 8an de decembro, 1935, okazis la Dua Oomoto-Afero, la kruala religia subpremo, senprecedenca en la moderna historio

de Japanio. La sanktaj terenoj de Oomoto kaj la instalaĵoj de organizo en la tuta lando estis ĝisfunde detruita, kaj Majstro DEGUĈI Onisaburo kaj ceteraj multaj kredantoj estis arestitaj kaj malliberigitaj: dum la tuta periodo de la Dua Mondmilito Oomoto devis paŭzi sian agadon.



En oktobro 1945, kun la militmalvenko de Japanio, la senkulpeco de Oomoto estis decidita; de tiam ja pasis 60 jaroj. Trapasinte la historion de la persekutiĝo pro religia kredo, Oomoto reviviĝis kiel fenikso. Nuntempe, kiam alvenis la 21a jarcento, sub Sinjorino DEGUĈI Kurenai, la Kvina Spirita Gvidantino (pranepino de Majstro DEGUĈI Onisaburo) Oomoto aktive elvolvas diversajn pionirajn agadojn en la kampoj, ekumena, mondfederisma, agrikultura, arta, vivetika, Esperanta k.a. kaj pli kaj pli grandigas la rondon de samideanoj, heredante la revon de Majstro DEGUĈI Onisaburo. Ni retrorigardu: en januaro 1926 (antaŭ 80 jaroj), la siatempa Eŭropa Centro de Universala Homama Asocio en Parizo eldonis la unuan numeron de sia organo “Oomoto Internacia” tute esperantlingva kaj komunikis vaste tra la mondo la pacan mesaĝon. Kaj, mi sentas profundan emociion ĉe tio ke ĉifoje en la urbo Braziljo, la internacia urbo de Sud-Ameriko, eldoniĝas la gazeto sub la sama titolo. Mi elkore esperas, ke de nun Oomoto Internacia disvolviĝos kiel Dia domo, komuna por ĉiuj homoj, kiuj deziras mondpacon kaj ke ĝi ree komunikos vaste la pacan mesaĝon cele al la mondo de la 21a jarcento.

En aŭgusto de la venonta jaro (2007), 42 jarojn post kiam okazis Universala Kongreso en Japanio en 1965, okazos la 92a Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo. Mi esperas, ke laŭeble multaj samideanoj partoprenos el Sud-Ameriko.

En la sama periodo, en Oomoto, en la urbo Kameoka, Kioto, ni celebros la Grandan Feston por gratuli la naskiĝon de Majstro DEGUĈI Onisaburo kaj, en la kadro de la festo, ni organizos ankaŭ Uta-feston, la festivalon por belo kaj paco, origine japanan, heredatan ekde la antikva tempo, kaj revivigita de Majstro DEGUĈI Onisaburo. Profitante la okazon de la UK, nepre vizitu ankaŭ la sanktan terenon de Oomoto. Do dezirante la viziton de laŭeble multaj geamikoj, mi finas mian saluton ĉe la eldono de la unua numero de “Oomoto Internacia”. Koran dankon!

## Fundação do órgão “Oomoto Internacia”

Por ocasião da fundação do órgão “Oomoto Internacia”, apresento as minhas cordiais saudações.

Para realizar o mundo de Miroku (sociedade ideal), nasceu a Oomoto, no dia 3 de fevereiro de 1892, na cidade de Ajabe, prefeitura de Kioto, Japão, de conformidade com as divinas revelações recebidas pela fundadora Nao Deguchi.

O outro fundador, ou co-fundador, o Mestre Onisaburo Deguchi, auxiliou a fundadora e, a partir de outubro de 1921, começou a ditar a volumosa obra (sagrada escritura) “Contos do Mundo Espiritual”, em 81 volumes, para interpretar as revelações, isto é, as profecias e advertências que a fundadora escreveu durante a sua vida. Assim, ele fundou a doutrina da Oomoto e, ao mesmo tempo, desenhou o mapa do caminho para o mundo de Miroku.

Entre outras evidências, parece que a América do Sul tem profunda relação com o plano Divino: em “Contos do Mundo Espiritual” foram ditadas narrativas que se desenvolveram nos cenários dessa parte do mundo, em quatro volumes. Assim, o fato de a Oomoto Internacia ter sido fundada em dezembro de 2004, em Brasília, - a sagrada capital do Brasil - na América do Sul, construída segundo uma profecia divina, não foi mero acaso, mas um acontecimento que obedeceu a um plano divino, no meu entendimento. Portanto, exprimo meu cordial agradecimento a todos os que colaboraram, com compreensão e ardente apoio, para que isso acontecesse.

Em junho de 1923 o Mestre Onisaburo Deguchi introduziu, na Oomoto o Esperanto, a língua da paz, ao mesmo tempo em que impulsionou o projeto de colaboração com diferentes religiões no mundo, e em fevereiro de 1924, atravessando o mar em direção à Mongólia, na Ásia, e a Jerusalém, no Oriente Médio, levou o grande sonho de realização da paz mundial, com base na unidade moral-espiritual.

O ambicioso plano de atingir Jerusalém foi interrompido provisoriamente, mas logo após seu regresso da Mongólia, em maio de 1925, ele organizou em Pequim, na China, a Federação Religiosa Mundial; posteriormente, em 9 de junho, ele fundou, em Ajabe, terra natal da Oomoto, a Associação Universal de Amor e Fraternidade, sob os ideais da “Filantropia Mundial” e “Todas as religiões têm uma mesma origem”. Assim, ele começou a trilhar o caminho do movimento pacífico internacional acima de todas as barreiras de raças, estados, religiões etc.

Depois esse movimento pela paz espalhou-se pela Ásia, Europa etc, chegando inclusive ao Brasil e outros lugares. Mas isso incomodou o governo japonês de então, que seguia o caminho do militarismo, e no dia 8 de dezembro de 1935 ocorreu o chamado “Segundo

Caso Oomoto”, uma opressão cruel e sem precedentes na moderna história do Japão. Os territórios sagrados da Oomoto e as instalações da organização no país inteiro foram destruídos, e encarcerados o Mestre Onisaburo Deguchi, juntamente com muitos outros fiéis. Em consequência, durante todo o período da Segunda Guerra Mundial, a Oomoto foi forçada a uma pausa em suas atividades.

Em outubro de 1945, com a derrota militar do Japão, a Oomoto foi absolvida; desde então, passaram-se sessenta anos. Terminado o tempo da perseguição por motivo de credo religioso, a Oomoto reviveu como a fênix. Atualmente, no limiar do século XXI, tendo à frente a Senhora Kurenai Deguchi (bisneta do Mestre Onisaburo Deguchi), a Quinta Guia Espiritual da instituição, a Oomoto desenvolve diferentes ações pioneiras nos campos do ecumenismo, do federalismo mundial, da agricultura, da arte, da ética, do esperanto, entre outros. E a cada dia aumenta o círculo dos coidealistas, herdeiros do sonho do Mestre Onisaburo Deguchi. Retrocedamos um pouco no tempo: há 80 anos, em janeiro de 1926, o então Centro Europeu da Associação Universal Amor e Fraternidade, em Paris, editou o primeiro número de seu órgão “Oomoto Internacia”, em esperanto, e transmitiu vastamente pelo mundo a mensagem de paz. E eu sinto uma profunda emoção porque, agora, em Brasília, cidade internacional da América do Sul, está sendo editado o órgão com o mesmo título. Eu espero, com alegria no coração, que de agora em diante a Oomoto Internacia se desenvolva como uma casa divina para todos os homens que desejam a paz mundial, e que ela continue a transmitir amplamente a sua mensagem de paz para o mundo do século que se inicia.

Em agosto de 2007, 42 anos depois do primeiro congresso mundial da língua internacional esperanto, ocorrido no Japão, em 1965, terá lugar em Yokohama, o 92o Congresso Mundial de Esperanto. Espero que o maior número possível de samideanos da América do Sul possa participar do evento.

Na mesma época, na cidade de Kameoka, em Kioto, a Oomoto celebrará a Grande Festa para comemorar a data de nascimento do Mestre Onisaburo Deguchi. Constará da programação também a Uta-festo, um festival de canto consagrado ao belo e à paz, originalmente em japonês, herança de tempos antigos, e revivido pelo Mestre Onisaburo Deguchi. Aproveitando o ensejo do Congresso Mundial de Esperanto, não deixe de visitar também o território sagrado da Oomoto. Assim, aguardando a presença do maior número possível de amigos, finalizo minha saudação à primeira edição da revista “Oomoto Internacia”. Cordiais agradecimentos.

## Reenkarniĝis la sopirata organo “Oomoto Internacia” en Braziljo

MAEDA Shigeki  
Direktoro de Oomoto Internacia

**L**a 3an de dec. 2004, en Hotelo Blue Tree Park prospere okazis la memora fondokunveno de *Oomoto Internacia*, danke al la kunlaboro kaj subteno de la esperantistoj kaj spiritualistoj (inkluzive de religiuloj) en Braziljo. Kaj la 15an de dec. en 2005, pasintjare, ni sukcesis organizi la memorfeston por la unua datreveno de *Oomoto Internacia*. Kaj, kelkajn monatojn post la memorfesto ni ja vidas kun grandaj feliĉo kaj plezuro la aperon de la organo “Oomoto Internacia”, tre elegante vestita per ĉarma kolora kostumo.

En 1926, januare, en Parizo, Francio, kun la fondiĝo de Eŭropa Sidejo de Oomoto eldoniĝis la unua numero de ĝia organo sub la titolo “Oomoto Internacia”; ĝuste ci tiu estas la antaŭfiguro de nia ĉifojna organo “Oomoto Internacia”. La organo, 4-paĝa en formato (37x40) kun tri kolora insigno apud titolo, ĉiumonate aperis kaj daŭris ĝis la jaro 1935. Sed, bedaŭrinde, pro la eksplodo de la Dua Oomoto-Afero (subpremeĝo fare de japana registaro) la Eŭropa Centro de Oomoto ne plu povis daŭrigi la agadon kaj sekve ankaŭ la eldonado de la organo estis interrompita. La subpremeĝo de la japana registaro, kiu siatempe marŝis sur la vojo de ultranaciismo, estis tiom intensa, ke ĉiuj konstruaĵoj kaj instalaĵoj de ambaŭ sanktaj terenoj “Ajabe kaj Kameoka” estis ĝisfunde detruitaj per multego da dinamitoj: ĉiu kredis ke Oomoto jam pereis.

Pro la grava kaj profunda vundo fare de la registaro Oomoto bezonis grandan penon kaj longan tempon ĝis reviviĝi fenikse. Tiel ankaŭ la organo “Oomoto Internacia” restis sen reviviĝi ĝis hodiaŭ.

Fakte, “Oomoto Internacia” estis la nomo, multe sopirata ne nur de oomotanoj, sed ankaŭ de multaj Eŭropaj esperantistoj.

Nu, 71 jarojn post kiam malaperis la Eŭropa Centro de Oomoto kune kun sia organo “Oomoto Internacia”, nun ni vidas ilian renaskiĝon en Braziljo, internacia metropolo, la nova sankta tero de la mondo, kun multnaciaj loĝantoj.

Estimataj legantoj, kiel vi vidas, ni, homaro, nun frontas al multaj seriozaj problemoj, lingva, politika, religia, ekonomia, media ktp. Ĉi tiujn ĉiujn mi ne detale mencias ĉi tie, sed solvi ilin laŭeble frue estas nepre necese, por ke ne atingu la pereon homaro kaj nia kara stelo, donita de Dio.

Do, la misio de *Oomoto Internacia* sin trovas en tio: ĝi klopodos por solvi la problemojn kunlabore kun ĉiuj dezirantoj de l’ eterna paco de nia mondo, pere de la internacia lingvo Esperanto, agante laŭ la instruoj de l’ Mastra Dio, Kreinto de la mondo.

En la komenca periodo nia organo “Oomoto Internacia” aperos 4-foje en la jaro, kaj tamen laŭ la pliboniĝo de la situacio pli multiĝos la apero.

Fine mi esprimas elkoran dankon al Emerson Werneck, respondeca ĵurnalisto, al Midiax la eldonejo de tiu ĉi organo, al Fransisko Matos, kiu bonvolis okupiĝi je la tradukado, al Elza Pereira Ramos, profesia pentristino, kiu aldonis la ĉarmon al la kovrilo, al Sônia Lucio kaj Paulo Pereira, la membroj de *Oomoto Internacia*, kiuj klopodis kun mi por aperigi la gazeton, kaj plue al ĉiuj kontribuantoj de la artikolo.



### Tri utaoj de DEGUĈI Sumiko pri Diaj favoroj

Nur senutila  
ne lasu eĉ peceton  
legomfolian  
naskitan el favoro  
de l’ ĉielo kaj tero.

Favoron Dian  
forĝesu ni neniam:  
eĉ en rizero  
troviĝas la Tri Dioj  
de l’ ĉielo kaj tero.

De l’ fajro, akvo  
kaj tero, la favorojn,  
kiuj nutras nin –  
jen Di-figuro vera  
de l’ ĉielo kaj tero.

## Reencarnou o saudoso veículo “Oomoto Internacia” em Brasília

No dia 3 de dezembro de 2004, no Hotel Blue Tree Park, em Brasília, ocorreu com grande êxito a memorável reunião de fundação da Oomoto Internacional, graças à colaboração e ao apoio dos esperantistas e espiritualistas (inclusive de religiosos). E no dia 15 de dezembro de 2005 conseguimos organizar a comemoração do primeiro aniversário da Oomoto Internacional. Alguns meses depois da comemoração, nós vemos, indubitavelmente com grande felicidade e prazer, o aparecimento do órgão “Oomoto Internacia”, trajando elegantemente uma charmosa veste colorida.

Em janeiro de 1926, em Paris, França, quando da fundação da Sede Européia da Oomoto, editou-se o primeiro número de seu órgão com o título “Oomoto Internacia”, que foi exatamente a figura preexistente do nosso atual “Oomoto Internacia”. O órgão, de 4 páginas em formato 37x40, com uma insígnia tricolor ao lado do título, circulou mensalmente até o ano de 1935. Mas, lamentavelmente, por causa da explosão da Segunda Questão-Oomoto (grande opressão desenvolvida pelo governo japonês), o Centro Europeu da Oomoto não pôde continuar suas atividades e, conseqüentemente, a edição do órgão também foi interrompida. A opressão, que marchava em direção ao ultranacionalismo, tornou-se tão intensa que todas as construções e instalações de ambos os sagrados terrenos “Ajabe” e “Kameoka” foram destruídos por grandes quantidades de dinamite, o que levou muitos a acreditarem que a Oomoto havia desaparecido.

Por causa da grave e profunda ferida causada pelo governo, a Oomoto precisou de um grande esforço e um longo tempo até renascer, como a fênix. Assim também o órgão “Oomoto Internacia” permaneceu sem vida, até hoje. Realmente, “Oomoto

Internacia” foi um nome desejado ardentemente não só pelos oomotanos, mas também por muitos esperantistas europeus.

Pois bem! Setenta e um anos depois do desaparecimento do Centro Europeu da Oomoto, juntamente com seu órgão “Oomoto Internacia”, nós vemos seu renascimento em Brasília, metrópole internacional, a nova terra sagrada do mundo, abrigando habitantes de várias nacionalidades.

Prezados leitores, como podemos ver, nós, a humanidade, atualmente estamos frente a inúmeros e sérios problemas – lingüísticos, políticos, religiosos, econômicos, ambientais etc. Não mencionarei todos eles detalhadamente aqui, mas solucioná-los o mais rapidamente possível é absolutamente necessário, para que a humanidade e a nossa querida estrela, dádiva divina, não cheguem ao aniquilamento.

Portanto, a missão da Oomoto Internacional se resume em esforçar-se para resolver esses problemas em colaboração com todos aqueles que desejam a eterna paz em nosso mundo, através da língua internacional esperanto, atuando em conformidade com os ensinamentos do Senhor Deus, Criador do mundo.

No período inicial, nosso órgão “Oomoto Internacia” será publicado quatro vezes ao ano. Entretanto, com a melhora da situação, as edições serão mais freqüentes.

Finalmente expresso cordiais agradecimentos ao Emerson Werneck, jornalista responsável; à Midiax, editora deste órgão; ao Francisco Mattos, que se propôs aos serviços de tradução; à Elza Pereira Ramos, pintora profissional, que tornou mais atraente a capa; à Sônia Lucio e ao Paulo Pereira, membros da “Oomoto Internacia”, que se esforçaram comigo para a publicação da gazeta e, ainda, a todos os que contribuíram com os artigos.

### Três poemas de Sumiko Deguchi sobre auxílio divino

Não devemos  
desprezar nem mesmo  
uma folha,  
pois tudo é criado  
pela graça de Deus.

Em nenhum momento  
devemos nos esquecer  
que existe  
a graça de Deus,  
mesmo num grão de arroz.

Deus se manifesta  
no Universo através  
das graças  
concedidas pelo fogo,  
pela água, pela terra.

## La unua datreveno de Oomoto Internacia

MAEDA Shigeki

### En etoso pura kaj agrabla

**L**a 15an de decembro 2005, okazis la memora festo de la 1-a datreveno de *Oomoto Internacia*. Ĉar la 15a de decembro estas naskiĝtago de D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof, la kreinto de Esperanto, kaj ankaŭ de Sinjorino DEGUĈI Kurenai, la Kvina Spirita Gvidantino de Oomoto, samtempe okazis ankaŭ iliaj gratulaj festoj. Vizitis 50 personoj por gratuli la datrevenojn.

Antaŭ la diserva ceremonio, de la 7a kaj duono okazis la prelego de prof. Benedicto Silva sub la temo “Oomoto kaj Spiritismo”. La prelego donis grandan emocion al ĉiuj aŭskultantoj: tuj post la prelego sinjoro Walter kaj Therezinha Felix Cardoso, la antaŭaj posedantoj de la konstruaĵo de *Oomoto Internacia*, ekvolis paroli pri sia impresoj, “Ĝis aŭskulti la prelegon de prof. Benedicto Silva



**La sanktejo de Oomoto Internacia - dum la diservo aperas sankta lumbulo**

Walter kaj Therezinha ekstaris sinjorino Ursulla Grattappaglia, unu el honoraj membroj de UEA (Universala Esperanta Asocio), kiu helpis konduki Oomoton en Braziljon, kaj ankaŭ ŝi konfesis la ĝojon, “Mi sentas feliĉon, ke la revo de “Oomoto ‘en malproksima lando’ realiĝis, kiel ni hodiaŭ povas gratule konstati, kaj ĝi komencos certe baldaŭ prosperi kun la beno de Dio”.

Je la 8a kaj duono komenciĝis la diserva ceremonio sub la ĉefcelebranto MAEDA Ŝigeki, direktoro de *Oomoto Internacia*, kun la helpo de sinjoro HUĜIMOTO Jasuharu, kiu gvidis la adorvizitantojn, kaj de lia edzino sinjorino HUĜIMOTO Kimiko, kiu ludis Jakumokotoon. La ceremonio celebriĝis en tre solena kaj pura etoso kaj, estis mirinde, dum la ceremonio ĉiam ŝvebis flavkolora spirita lumbulo kun diametro de 30 centimetroj. La spirita lumbulo eĉ aperis en la foto de sinjoro José Carlos Dorini Ramos.

Post la diserva ceremonio, kiel kutime, okazis festeno kaj ĉiuj vizitantoj tie kaj tie en la salono de *Oomoto Internacia* ĝuis renkontiĝojn kun babiladoj en Esperanto kaj en la portugala, trinkante sukajn kaj manĝante la japanajn kuiritaĵojn, kiujn bonvolis prepari sinjorino HUĝimoto. Kvankam ne estis multa la nombro de vizitantoj, la etoso estis tre pura kaj agrabla.



**Prelegas prof. Benedicto Silva, sub la temo “Oomoto kaj Spiritismo”**

mi havis la opinion, ke Japanio estas lando, kie ankoraŭ ne bone disvolviĝas spiritismo, sed hodiaŭ mi ŝanĝos ĉi tiun mian opinion”. Post sinjoro



## O primeiro aniversário da Oomoto Internacional

### Em um ambiente puro e agradável

No dia 15 de dezembro de 2005 foi celebrado o primeiro ano de atividades da Oomoto Internacional. Porque essa data marcava também os aniversários do Dr. Lázaro Luís Zamenhof, o iniciador do esperanto, e da Senhora Kurenai Deguchi, a Quinta Guia Espiritual da Oomoto, os festejos ocorreram simultaneamente, com a presença de cerca de cinquenta pessoas.

Às 19h30, antes da cerimônia religiosa, ouviu-se a palestra do Prof. Benedicto Silva sobre o tema “Oomoto e Espiritismo”; logo após, o casal Walter e Therezinha Felix Cardoso, ex-proprietários do prédio da Oomoto Internacional, externaram suas impressões: “Antes de ouvir a palestra do Prof. Benedicto Silva, achávamos que o Japão era um país onde o Espiritismo ainda não estava bem desenvolvido, mas a partir de hoje mudo minha opinião”.



Adorvizitantoj atendas la komencon de la memora festo.

Depois das palavras de Walter e Therezinha, levantou-se a Senhora Ursula Grattapaglia, membro da UEA (Associação Mundial de Esperanto) e que



Sinjoro Maeda kaj gesinjoroj Hujimoto servas en la meso

colaborou para a vinda da Oomoto para Brasília, e também expressou sua alegria: “Sinto-me feliz porque o sonho da Oomoto, “em um país distante”, realizou-se, como podemos gratamente constatar, e ela certamente em breve vai prosperar, com as bênçãos de Deus”.

Às 20h30 teve início a cerimônia religiosa, oficiada pelo principal celebrante, Senhor Shigeki Maeda, diretor da Oomoto Internacional, auxiliado pelo Senhor Jasuharu Fujimoto, que orientava os acompanhantes e por sua esposa, Kimiko Fujimoto, que tocava o Jakumokoto. A cerimônia foi celebrada num ambiente muito puro e solene e, admiravelmente, uma bola luminosa espiritual, de cor amarela, com diâmetro de trinta centímetros pairava sobre os participantes. Essa bola inclusive apareceu em fotografia obtida pelo Sr. José Carlos Dorini Ramos.

Após a cerimônia, como de costume, foram servidos sucos e várias iguarias, inclusive da culinária japonesa, que foram preparadas com esmero pela Senhora Hujimoto, tendo os visitantes ocupado o salão da Oomoto Internacional, onde ocorriam encontros e conversas em esperanto e em português.

Embora não tenha sido muito grande o número dos participantes, tudo ocorreu num ambiente puro e agradável.

## Delegito de UEA gratulas Oomoton

La 15-an de decembro 2005, ĉe la malfermo de la solenaĵoj memorigaj pri la Unujara Datreveno de Oomoto Internacia, laŭ invito de prof. MAEDA Shigeki, prezidanto de tiu organizaĵo, prof. Benedicto SILVA, delegito de UEA en São José do Rio Preto-SP, faris prelegon. Jen resumo de lia prelego:

Oomoto naskiĝis ĝuste en la Novjaro de 1892, en la japana urbo Ajabe, dank'al la eksplodo, se tiel diri, de la eksterordinara mediumeco de malriĉa 57-jaraĝa vidvino, s-ino DEGUĈI Nao.

Tiu tre malriĉa vidvino, kun dek du infanoj, surprize komencis paroli misterajn frazojn, laŭŝajne surprinrantajn de ŝia ventro, kvazaŭ ia enorma perlo, laŭ ŝiaj propraj vortoj. Komence, tiuj frazoj laŭŝajne ne havis signifon.

Poste tamen la najbaroj komencis duonvidi en ili ian revelacian mesaĝon, ĉar ili averte anoncis la rekonstruadon de la antaŭa mondo, kiu baldaŭ ekfloros kiel la ume-floroj en la komenco de printempo. Tiuj frazoj anoncis la finon de iu mondo, kie la plifortaj perforte regas la malplifortajn, en diabla agado.

Tiamaniere Nao estis ĉiutage posedita de la estulo, kiu devigis ŝin paroli je ĉiu horo en la tago aŭ en la nokto, kaj kiu donis al ŝi nenian ripozon.

Ŝi tute ne komprenadis la fenomenon, al kiu ŝi estis submetita, kaj iam ŝi demandis:

— Kiu estas vi? La respondo venis tuj: — Mi estas la Dio Uŝitora no Konjin.

Laŭ la Oomoto-instruoj, Nao estis ofte posedita de la Dio Uŝitora no Konjin, kiu descendis sur la Teron por revelacii al la homoj iun pli bonan mondon.

Pliposte la najbaroj kaj la familianoj mem de Nao, konsideris sin ĝenataj de la senĉesa parolbruo de Nao, en tia grado, ke ili decidis enkarcerigi ŝin en krudan kaĝon el ligno, el kiu ŝi ne povis eliri nek ĝeni la najbararon per la senfina prediko, kiun eĉ ŝi mem ne komprenis.

Ĉio vane, ĉar Nao trovas najleton en sia kruda kaĝo, prenas ĝin, kaj per ĝi komencas skribi sur la muro de sia karcero, per belaj literoj de la japana alfabeto, la frazojn, kiujn ĝis tiam ŝi nur diradis.

Ĝenerala ekmiro! Nao, kiu estis analfabeta, komencis skribi!

La vero montriĝis. Nao skribis aŭtomate. Ŝi estas mediumo!

Uŝitora no Konjin postulis, ke ŝi uzu inkon kaj tuĉpenikon, sed ŝi kontraŭstaris. — Kial uzi ĝin, se mi ne scias skribi? Severe, la Dio ordonis, ke ŝi tuj obeu Lin.

Kaj tial, ekde tiam Nao skribis dum preskaŭ du jardekoj, kaj ŝiaj skribaĵoj, kiuj okupis 10 mil kajerojn el japana papero, konsistigis la Sanktan Skribon de Oomoto, titolitan Ofudesaki, aŭ Diaj Revelacioj de Oomoto, en sep volumoj.

Estas grave noti, ke la Spirito estas saĝaj. Se en Okcidento la spiritismaj instruoj estas formulitaj en la lumo de la Evangelio de Kristo, en Oriento la instruoj neeviteble sin banas en la saĝo de Ŝintoismo kaj Budhismo.

Malsame ol tio, kio okazas en aliaj religioj, Oomoto havas du fondintojn: la Fondintinon DEGUĈI Nao kaj la Kunfondinton DEGUĈI Onisaburo.



Prof. Benedicto Silva

DEGUĈI Nao, la Fondintino, estas dotita per la Spirito Izu. Ŝi prezentas la manifestiĝon de vira Spirito en virina korpo, dum DEGUĈI Onisaburo estas la manifestiĝo de virina Spirito en vira korpo. Nao estas la Patro de la homaro, kaj ŝia Spirito Izu reprezentas la fajron, kiu flamas vertikale. Onisaburo tamen estas dotita per la Spirito Mizu, kaj estas la Patrino de la homaro. Lia Spirito (Mizu) funkcias kiel la akvo, kiu disverŝiĝas horizontale tra la tuta materia mondo, kies savanto li estas. La du Spiritoj, Izu kaj Mizu, estas same kiel varpo kaj vefto ĉe la teksado de brokato.

Kiel en Ŝintoismo, la kulto al la Prapatroj kaj la purigado tiel same konsistigas la precipajn ceremoniojn de Oomoto. Kiel en Ŝintoismo, tiel same en Oomoto oni respektas la manifestaĵojn de la Natur-Patrino, nome la teron, la akvon, la fajron, la ŝtonon, la monton, la venton ktp.

Oomoto prezentas la Tri Regulojn pri Lernado:

1. Observu la formojn de la universo, por kontempli la korpon de la Vera Dio.

2. Observu la ekzaktan marŝon de la universo, por kontempli la forton de la vera Dio.

3. Observu la sentemecon de la vivaĵoj, por kontempli la Spiriton de la vera Dio.

Oomoto estas ekumena religio.

Tiu ekumeneco igas ĝin konsideri sin unu el la vojoj, kondukantaj la homaron al la Dia regno aŭ al la Mondo de Miroku, kie la homoj povos ĝui la delicojn de la ĉielula regno sur la Tero: iu mondo de paco kaj frateco.

Por la politiko, Oomoto rekomendas la Mondfederismon.

En 1923 DEGUĈI Onisaburo enkondukis Esperanton en Oomoton kiel unu el la oficialaj lingvoj de tiu organizaĵo.

Onisaburo, kiu estis esperantisto kaj artisto, diris: “Arto estas la Patrino de Religio”. Pro tio en Oomoto oni senĉese kultivas teceremonion, kaligrafion, muzikon, poezion, ceramikon, teatron (ĉefe la no-dramon) ktp.

La ĉefaj sanktaj skribaĵoj de Oomoto jam estas tradukitaj en Esperanto, kaj el Esperanto en la portugalan lingvon.

Estas granda la simileco de la Zamenhofa Homaranismo kun la Mondfederismo rekomendata de Oomoto.

Se validiĝos ĉiuj tiuj principoj, ni estos certaj, ke ni estas laborantaj por starigi sur la Tero la Mondon de Miroku, laŭ la sankta volo de Dio.

## Delegado da UEA parabeniza Oomoto

**No dia 15 de dezembro último, por ocasião da abertura das solenidades comemorativas do primeiro aniversário da Fundação da Oomoto Internacia, foi proferida uma palestra pelo prof. Benedicto Silva, delegado da UEA na cidade paulista de São José do Rio Preto. Eis o resumo:**

A Oomoto surgiu exatamente no dia de Ano Novo de 1892, na cidade japonesa de Ayabe, graças à explosão, por assim dizer, da extraordinária mediunidade de uma pobre viúva, de 57 anos de idade, chamada Nao Deguchi.

Essa viúva paupérrima, surpreendentemente começou a proferir frases misteriosas, que pareciam subir de seu ventre, como uma pérola. De início, essas frases pareciam não ter sentido. Mais tarde, porém, as pessoas da vizinhança começaram a vislumbrar nelas uma mensagem reveladora, pois anunciavam a reconstrução do mundo anterior que em breve desabrocharia como a flor da ameixeira no início da primavera. Preconizavam o fim de uma era em que os mais fortes escravizavam os menos fortes, numa ação diabólica.

Segundo os ensinamentos da Oomoto, Nao era constantemente possuída pelo Deus Ushitora no Konjin, que descera à Terra para revelar aos homens um mundo melhor.

Mais tarde, a vizinhança e os próprios familiares de Nao viram-se incomodados pelo incessante falatório de Nao, a ponto de decidirem encarcerá-la numa jaula rústica, de madeira, de onde não podia sair nem perturbá-los com a infundável pregação que ela própria não entendia.

Tudo em vão, pois Nao descobre um pequeno prego no interior de sua rústica prisão, apanha-o, e com ele passa a escrever, na parede do cárcere, em belas letras do alfabeto japonês, as frases que até então ela só articulava.

Espanto geral! Nao, que era analfabeta, passou a escrever! Revelou-se a verdade. Não escrevia automaticamente. Era médium!

O próprio Ushitora no Konjin exigiu que ela usasse tinta e pincel, mas ela retrucou. —Para quê, se não sei escrever? Com severidade, o Deus ordenou que ela o obedecesse prontamente.

E assim, desde então, Nao escreveu durante quase duas décadas, e seus escritos, que preencheram 10 mil cadernos de papel japonês, vieram a constituir a Escrita Sagrada da Oomoto.

Importante notar que os Espíritos são sábios. Se no Ocidente os ensinamentos são formulados à luz do

Evangelho de Cristo, no Oriente, como não podia deixar de ser, são banhados na sabedoria do Xintoísmo e também do Budismo milenares.

Diferentemente das outras religiões, a Oomoto tem dois fundadores: a Fundadora Nao Deguchi, e o Co-fundador, Onisaburo Deguchi.

Nao Deguchi, a Fundadora, é dotada do Espírito de Izu. É a encarnação de um Espírito masculino em seu corpo feminino. Onisaburo Deguchi, por sua vez, é dotado de Espírito feminino em corpo masculino. Nao é como que o Pai da humanidade. Seu Espírito de Izu representa o fogo, que arde verticalmente. Onisaburo, porém, é dotado do espírito de Mizu, e é como que a Mãe da humanidade. Mizu representa a água, que se espalha horizontalmente, abrangendo toda a Terra, de que é o salvador. Os dois Espíritos — Izu e Mizu - são como a urdidura e a trama na composição de um brocado.

Como no Xintoísmo, o culto dos antepassados e a purificação constituem as cerimônias principais da Oomoto. Veneram-se as manifestações da mãe-natureza: a terra, a água, o fogo, a pedra, etc.

A Oomoto apresenta as três regras do aprendizado:

1. Observe as formas do universo, para contemplar o corpo do verdadeiro Deus.
2. Observe a marcha exata do universo, para contemplar a força do verdadeiro Deus.
3. Observe a sensibilidade dos seres vivos, para contemplar o Espírito do verdadeiro Deus.

A Oomoto é uma religião ecumênica. Esse ecumenismo a faz considerar-se um dos caminhos que conduzem a humanidade ao Reino Divino ou ao Mundo de Miroku, onde os homens poderão fruir as delícias do Reino Celestial aqui na Terra: um mundo de paz e fraternidade. Para a política, a Oomoto preconiza o federalismo mundial.

Onisaburo Deguchi introduziu o Esperanto na Oomoto já no ano de 1923, como uma de suas línguas oficiais.

Onisaburo Deguchi, que foi esperantista e artista, disse: A Arte é a mãe da Religião. Por isso na Oomoto se cultivam permanentemente a cerimônia do chá, a caligrafia, a música, a poesia, a cerâmica, o teatro, principalmente o teatro nô etc.

As principais escritas sagradas da Oomoto já estão traduzidas ao esperanto, e do esperanto ao português. É grande a semelhança entre o Homaranismo de Zamenhof e o Federalismo Mundial preconizado pela Oomoto.

Fazendo valer tais princípios, temos certeza de que implantaremos aqui na Terra o Mundo de Miroku, como a sagrada vontade de Okami-sama.

# Aktivas la Kvina Spirita

## Spirit-konsola Ceremonio por viktimoj de atombomboj en Hiroŝima kaj Nagasaki

La 6an de aŭgusto, 1945, super la urbo Hiroŝima, konata kiel la urbo de pura akvo, ja eksplodis atombombo kaj mortis 55000 civitanoj. De tiu tragika tago pasis 60 jaroj, kaj la 6an de aŭg. 2005, en la memora parko por la paco de Hiroŝima okazis la ceremonio por la ripozo de la mortintoj, memore al la 60a datreveno de tiu abomeninda tago. La Kvina Spirita Gvidantino de Oomoto ĉeestis en ĝi, kaj du tagojn post la ceremonio en Hiroŝima, ŝi vizitis la urbon Nagasaki, la dua atombombita loko, kie okazis (en du tagoj – la 8an kaj 9an de aŭg. 2005.) ankaŭ la ceremonio por konsoli la viktimojn de atombombo.



La Kvina Spirita Gvidantino ofertas bukedon al la viktimoj de atombombo en la ceremonio en Hiroŝima



Kiel la plejsupera konsilanto de la komitato pri religioj de la Mondfederista Organizo Majstrino alparolas al la viktimoj de atombombo por konsolo)

## Majstrino konfesis sian revon

En Utafesto, okazinta en la pasintjara Granda Festo de Zujsej, la Kvina Spirita Gvidantino oferis utaoon:

わが願い  
エスペラントの  
歌まつり  
人類同胞(はらから)こそりて  
エルサレムの野に

Ho, aspiras mi  
al la utaa festo  
ja en Esperant’:  
fratar’ de l’ tuta mondo  
jen sur land’ Jerusalem’.

Ŝi deziras ke multaj homoj en la mondo versu utaojn aŭ poemojn por la paco kaj oferu ilin al Dio en Utafesto, kiu eventuale okazos en Jerusalemo.



Kun ŝikiŝoj de sia avo, Majstro DEGUĈI Hidemaru, kiu per ili eble antaŭdiris la realiĝon de la Utafesto en Jerusalemo)

# Gvidantino de Oomoto

## “Mitingo de la civitanoj en Prefektejo Kioto – ĉiam pli klopodu por la realiĝo de la paco en Mezoriento”

Kiel unu el alvokantoj de la “Mitingo de la civitanoj en Prefektejo Kioto – ĉiam pli klopodu por la realiĝo de la paco en

Mezoriento” Majstrino vizitis la oficialan domon de sinjoro KOIZUMI Ĵuniĉiroo, Japana Prezidento.



kun Japana Prezidento



## Bonan modelon por la japana agrikulturo

“La diversaj teruraj aferoj, kiuj nun okazas en la tuta mondo, povas esti la averto de Dio al ni, homoj, forgesintaj la favorojn de la ĉielo kaj la tero” rakontis Majstrino en la maja numero (2003) de la revuo Oomoto en la japana lingvo. Kaj plue dirante “Ni devas kare trakti teron kaj reakiri la koron preĝi al Dio”, ŝi diligente okupiĝas je agrikulturo intertempe de multaj oficialaj taskoj.

Majstrino rikoltas fabojn

## Dia Deziro

**Ursula Grattapaglia**

**M**i sentas ne nur honoron kaj ĝojon, sed grandan feliĉon, ke la revo pri Oomoto- Centro ‘en malproksima lando’ realiĝis, kiel ni hodiaŭ povas gratule konstati, kaj ĝi komencos certe baldaŭ prosperi, kun la beno de Dio.

Nia majstro Benedicto brile prezentis la filozofion de Oomoto al ni hodiaŭ, kaj mi sincere lin gratulas por lia longjara fidela laboro.

Kun ĝojo ni konstatas la ĉeeston de la eksaj posedantoj de la domo, sinjorino Teresa kaj sinjoro Valter. Ili la unuan fojon ĉi-vespere revidas sian antaŭan hejmon, kiun ili per multa amo konstruis por sia sep-persona familio. Kaj oni povas vidi ilian kontentecon, ĉar ili estas spiritistoj, kaj havi nun ĉi tie Oomoton estas por ili vera feliĉo kaj beno.

Se vi permesas, mi deziras aldoni kiel entute



Interparolas s-ro Maeda kun ges-roj Grattapaglia ĉe la memora festo de la Unua Datreveno de O.I.

pri la plano de la Spirita Gvidantino realigi la revelacion de sia pra-parencino Nao Deguĉi, ricevita de antaŭ pli ol cent jaroj. Evidente ni nin disponigis laŭ niaj kapabloj.

En julio denove ni parolis kun s-ro Maeda en Beijing, Ĉinio, kiam ni legis la revelacion 250 el la jaro 1899 ‘Mi jam diris ke ĉi tiu Dia afero komencos disvolviĝi el malproksima lando’.

En septembro s-ro Maeda alvenis en Braziljo kaj ni komencis serĉi taŭgan domon. Ni vizitis multajn domojn, sed komprenis ke la plej taŭga por la bezonoj de Oomoto estus la domo de s-ro Walter. Cetere la prezo estis la plej oportuna.

Tiam alvenis pluraj aliaj direktoroj de Oomoto el Japanio kaj el Sao Paulo, kaj ankaŭ ili ŝatis la domon kaj la ĝardenon. Do, la kontrakto estis farita, decidita ankaŭ la festo de la inaŭguro kaj la ceremonio en la Teozofia Instituto de nia amiko d-ro Ulisses Riedel de Resende.

Kaj jen hodiaŭ ni estas ĉi tie, kunvenantaj por celebri la unuan datrevenon, ekzakte okaze de la naskiĝtago de la Kvina Spirita Gvidantino Kurenai Deguĉi.

Mi gratulas sincere al sinjoro Maeda, kiu malsupre preparas la dank-ceremonion, kaj mi salutas vin ĉiujn tre amike!”



Trankvila momento antaŭ la meso por la Unua Datreveno

la kontakto kun sinjoro Maeda okazis.

Giuseppe kaj mi partoprenis internacian kongreson en Osaka, Japanio, en majo 2004, kiam sinjoro Maeda kontaktis nin por paroli

## Desígnio de Deus

**E**u sinto não somente honra e alegria, mas grande felicidade, porque o sonho da Oomoto que diz respeito a ‘um país distante’, realizou-se, como nós podemos hoje felizmente constatar, e ele começará certamente em breve a prosperar, com a benção de Deus.

Nosso mestre Benedicto apresentou-nos brilhantemente hoje a filosofia da Oomoto, e eu o parabenezo sinceramente pelos seus longos anos de trabalho fiel.

Com alegria constatamos a presença dos ex-proprietários desta casa, senhora Teresa e senhor Valter. Pela primeira vez após a venda deste imóvel, eles retornam a sua antiga casa, a qual eles construíram com muito amor, para sua família, formada por sete pessoas. E nós podemos ver o contentamento deles, por eles serem espíritas e por a Oomoto agora estar funcionando aqui, o que para eles é realmente motivo de felicidade e benção.

Se me permitem, eu gostaria de relatar como aconteceu o nosso contato com o senhor Maeda. Giuseppe e eu participamos de um congresso em Osaka, no Japão, quando o senhor Maeda nos contactou para falar sobre o plano da Dirigente Espiritual da Oomoto de realizar a revelação recebida por sua ascendente familiar (fundadora da Oomoto) Nao Degucxi, feita há mais de cem anos.

Evidentemente nós nos disponibilizamos, de acordo com nossas possibilidades.

Em julho, novamente, nós voltamos a falar com o senhor Maeda em Beijing, na China, quando então nós lemos a revelação de número 250 das Revelações Divinas: ‘Eu já disse que essa obra Divina começará a se desenvolver a partir de um país distante’.



**Aspekto de la konstruado de Oomoto Internacia, rigardata el la ĝardeno**

Em Setembro, o senhor Maeda veio a Brasília, e nós começamos a procurar uma casa apropriada. Nós visitamos muitas casas, mas entendemos que a mais adequada para as necessidades da Oomoto seria essa casa pertencente ao senhor Valter. Ademais o preço do imóvel foi o mais adequado. Nesse mesmo tempo vieram outros diretores da Oomoto do Japão, e de São Paulo, e eles todos também gostaram do imóvel e do jardim. Então o contrato foi firmado e também decidiu-se sobre a realização da festa de inauguração da Oomoto, além da cerimônia do Instituto Teosófico, do nosso amigo Dr. Ulisses Riedel de Resende.

E ei-nos aqui hoje reunidos para celebrar o primeiro aniversário, exatamente por ocasião da data de nascimento da Quinta Guia Espiritual da Oomoto, senhora Kurenai Degucxi.

Eu parabenezo sinceramente o senhor Maeda, que se encontra no andar de baixo, preparando a cerimônia de agradecimento, e quero cumprimentá-los todos muito amigavelmente.

(Saudações proferidas por Ursula Grattapaglia, por ocasião do primeiro aniversário da Oomoto Internacia)

## La nova domo de Oomoto

Walter kaj Therezinha Felix Cardoso

**K**un granda plaĉo ni ricevis la inviton partopreni, kune kun niaj gefiloj kaj nepoj, la solenaĵojn de la unua datreveno de Oomoto Internacia en ties instalaĵoj en Braziljo (DF).

La kialo kuŝas en la fakto, ke ni estas la transdonintoj de la domposedo al ties novaj posedantoj kaj ni scivolemadis pri ĝia celo, pro tio ke ĝi estis de ni konstruita kun granda kareso.

Ni tre ĝojas konstati, ke la domo estas en ĝustaj manoj kaj ĉefe bone zorgata de fratoj apartenantaj al spiritualisma religia kredo tre simila al tiu, kiun ni praktikas.

La domo estis de ni konstruita kiel loĝejo de

granda familio ampleksanta tri generaciojn, kiuj en ĝi kunvivis en feliĉa, harmonia kaj ama etoso.

La parolado farita okaze de la solenaĵoj permesis al ni konatiĝi kaj kun la origino kaj kun la filozofio, kiu konsistigas la gvidlinion de la Religia Organizo Oomoto, tre simila al la noblaj instruoj de la Evangelio verkita de Allan Kardec.

Ĉiokaze, ni gratulas la membrojn de *Oomoto Internacia* pro la ĝustatempa iniciato kaj samtempe ni esprimas bondezirojn pri plena sukceso al via grava religia misio en nia lando, kie certe ne mankos la karitato kaj la amo al la proksimuloj.



## A nova casa da Oomoto

**C**om muito agrado recebemos o convite para participar, com filhos e netos, da comemoração do primeiro aniversário da Oomoto Internacia em suas instalações em Brasília.

Isto porque fazia um ano que havíamos transferido a posse da residência para seus novos donos e tínhamos curiosidade sobre sua destinação, porquanto a mesma foi edificada com muito carinho.

Ficamos alegres ao constatar que o imóvel está em boas mãos e, principalmente, bem cuidado por irmãos de crença religiosa espiritualista muito semelhante à que temos.

A residência fora construída por nós para abrigar uma grande família, abrangendo três gerações, que nela conviveram num ambiente de felicidade, harmonia e amor.

A palestra que foi proferida na ocasião permitiu que adquiríssemos conhecimento das origens e da filosofia que norteiam a associação religiosa



La nova sidejo de O.I. en Lago Norte

Oomoto, caracterizada por grande semelhança com os elevados preceitos constantes do evangelho codificado por Allan Kardec.


No ensejo, congratulamo-nos com os integrantes da Oomoto Internacia pela oportuna iniciativa, ao mesmo tempo em que formulamos votos de pleno êxito na sua importante missão de natureza religiosa, no país onde certamente estarão presentes a caridade e o amor ao próximo.



## Dia Lingvo

Homaro!! Vi ĉiuj fermu trankvile viajn okulojn kaj recitu unu frazon de tiu ĉi mondolingvo.  
Kiel sonoras al vi tiu agrabla kaj paca melodio?  
Gustumu la postan mildecon kaj trankvilecon de via koro.  
Kaj laŭte recitu la 1-an ĉapitron de la Evangelio de Sankta Johann.  
“*En la komenco estis la Vorto, kaj la Vorto estis kun Dio...*”  
Ĝuste ĉi tiu Esperanta lingvo estas Dio, estas Dia lingvo.  
Kiu povos uzi ĉi tiun lingvon, trovos en ĝi Dion.  
Ankaŭ la okultan esoteron en la mantrista sekto povos gustumi nur tiuj, kiuj uzos ĉi tiun lingvon.

*el Neceso de Esperanta Lingvo*



Bril-tebovlo “Amacuotome (ĉiela knabino)”, farita de Majstro Onisaburo

## Língua divina

Ó, humanidade!! Fechem, todos vocês, tranqüilamente seus olhos e recitem uma frase desta língua mundial.

Como lhes soa essa agradável e pacífica melodia?

Depois degustem a suavidade e tranqüilidade de seu coração.

E recitem em voz alta o primeiro capítulo do Evangelho de São João.

“*No princípio era o Verbo, e o Verbo estava com Deus...*”

Exatamente esta língua esperanto é Deus, é uma língua de Deus.

Quem puder usar esta língua, nela encontrará a Deus.

Também o oculto esoterismo na seita mantrista poderá degustar apenas aquele que usar essa língua.

excerto de *Necesos de Esperanta Lingvo* (A necessidade da língua esperanto)

## Ĉu Koincido?

**José Carlos Dorini Ramos\***

**K**iel okazas al multaj esperantistoj, de longe mi scias, ke Oomoto estas grava religia organizo. Pere de ĝia samnoma revuo mi scias ankaŭ, ke tiu organizo forte apogas Esperanton. Tamen nur en la 1981-a jaro, okaze de la 66-a Universala Kongreso de Esperanto en Brasília, mi sukcesis persone konstati la efektivan partoprenon de Oomoto-membroj en la Esperanta medio. Esperanto-movado en Brazilo estas vigla kaj en ĝiaj multnombraj eventoj oni havas la ŝancon koni multajn samideanojn. Tial mi konis elstaran klerulon, nome Profesoro Benedicto Silva, kiu iam venis al Braziljo, nuntempa mia loĝa urbo, kaj havigis al mi la honoron akcepti lin ĉe mia hejmo.

Antaŭ ol translokiĝi al la brazila ĉefurbo, mi loĝis en Sorocaba (Sorokaba) kaj multfoje mi vojaĝis per trajno de tiu loko al São Paulo (San Paŭlo). En la trairado situas la urbo Jandira (Ĵandira) kaj ĉiam, kiam la trajno ĝin preterpasis, io nedefinita kaptas mian atenton. Kial? Ĉu pro tio, ke Jandira estas nomo ankaŭ de tre ŝatata amikino de mia familio aŭ ĉu pro ne klara intuicio?

Nu, kial mi mencias tiujn tri faktojn? Kiu konas la movadon de Oomoto en Brazilo tucerte scias, ke ili interplektiĝas, ĉar Profesoro Benedicto Silva tre kompetente aktivis en ĝi kaj ĝuste en Jandira situas la Sud-Amerika Centro de Oomoto. Iamaniere do mi sentas min ligita al Oomoto, tamen mi neniam povis supozi, ke iun tagon Oomoto venos al Brasília kaj ke tia ligo iĝos pli streĉa.

Jen la okazintaĵoj, kiuj daŭre restas en mia koro. Je la fino de novembro 2004 unufoje mi aŭdis, ke Oomoto starigos oficejon en Braziljo. “Plezuriga novaĵo”, mi opiniis, “ĉar tio riĉigos la lokan Esperanto-movadon”. Du tagojn antaŭ la imponaj solenaĵoj, kiuj por ĉiam memorigos al mi la starigon de *Oomoto Internacia*, mi konis la Estron de tiu oficejo, s-ro MAEDA Ŝigeki, kaj

la tiaman Ĝeneralan Direktoron de Esperanto-Populariga Asocio (EPA), s-ro KAWAMURA Yas.

Invitite de s-ino Ursula Grattapaglia, unu el la ĉefaj organizintoj de la evento, mi helpis s-ron

Kawamura pere de dulingva anonco de diversaj programeroj kaj dum la memorfesteno de la malfermo de *Oomoto Internacia*, je la 3-a de decembro, en luksa hotela salonego, kaj en la solenaĵo “Komuna Preĝo”, en la sekvanta tago, en la Teozofia Instituto de Brasília.

Detalojn pri la du eventoj ŝajnas al mi superflue komenti, ĉar la eldono n-ro 451/452 de Oomoto-revuo riĉenhave raportas pri ili, kune kun aliaj eventoj ligitaj al la vizito de Spirita Gvidantino DEGUĈI Kurenai, de la ĉefdirektoro de Oomoto, s-ro ŜIMAMOTO Kunihiko, de pliaj aliaj gravuloj kaj multaj membroj de la karavano - entute 87 homoj - kiuj venis el Japanio speciale por kunfesti la 80-an Jubileon de Oomoto-misiado en Brazilo.

*Oomoto Internacia* datrevenas kaj la ĉi-tiea esperantistaro entuziasme konstatas ties progreson dum tiu unua jaro, kaj volonte partoprenas en ties eventoj.

Gratulon kaj al s-ro Maeda kaj al la skipo de *Oomoto Internacia* pro la allogaj kunfratiĝaj kunvenoj, realigitaj dum la tuta jaro da aktivado en Brasília! Gratulon kaj al la gvidantoj de Oomoto disaj tra la tuta mondo kaj al ĝia membraro, pro la senĉesa laboro por frateca monda interkompreno! Gratulon al ni, geesperantistoj, kiuj povas kalkuli je la konstanta apogo de grava tutmonda organizo, kia Oomoto.

**\* Sro. Dorini Ramos estas la direktoro de la Centra Oficejo de Brazila Esperanto-Ligo**



## Coincidências?

Como ocorre com muitos esperantistas, há tempos sei que a Oomoto é uma organização religiosa importante. Através de sua revista, igualmente chamada Oomoto, sei também que essa organização apóia fortemente o Esperanto. Porém, somente no ano de 1981, por ocasião do 66º Congresso Mundial de Esperanto, consegui constatar, pessoalmente, a efetiva participação dos membros da Oomoto no meio esperantista.

O movimento esperantista no Brasil é vigoroso, e nos seus inúmeros eventos temos a oportunidade de conhecer muitos co-idealistas. Assim conheci alguém muito ilustre, o Dr. Benedicto Silva, o qual uma vez veio à Brasília, onde atualmente resido, possibilitando-me a honra de recebê-lo em meu lar.

Antes de me mudar para a capital brasileira, residi em Sorocaba, e muitas vezes viajei de trem desse local para São Paulo. No trajeto está a cidade de Jandira, e sempre que o trem por ela passava, algo indefinido me chamava a atenção. Por quê? Acaso por que Jandira é também o nome de uma amiga muito querida de minha família ou por causa de uma intuição não muito clara?

Ora! Por que menciono esses três fatos? Quem conhece o movimento Oomoto no Brasil, sem dúvida sabe que eles se entrelaçam, pois o Dr. Benedicto Silva com muita competência atua nesse movimento, e exatamente em Jandira fica o Centro Sul-Americano da Oomoto.

De alguma forma, portanto, sinto-me ligado à Oomoto; porém nunca poderia supor que, um dia, a Oomoto viesse para Brasília, e que essa ligação seria mais intensa.

Eis os acontecimentos que permanecem em meu coração. No fim de novembro de 2004, pela primeira vez ouvi que a Oomoto criaria um escritório em Brasília. “Novidade prazerosa”, opiniei, “pois isso

enriquecerá o movimento esperantista local”. Dois dias antes das imponentes solenidades, que para sempre me farão lembrar a fundação da Oomoto Internacia, conheci o dirigente desse escritório, Sr. Shigeki Maeda e o Diretor Geral da Associação de Popularização do Esperanto, Sr. Yas Kawamura.

Convidado pela Sra. Ursula Grattapaglia, uma das principais pessoas que organizaram o evento, ajudei o Sr Kawamura no anúncio bilingüe de diversos itens dos programas da festa comemorativa da abertura da Oomoto Internacia, em 3 de dezembro, num luxuoso salão de hotel, e na solenidade “Prece Ecumênica”, no dia seguinte, no Instituto Teosófico de Brasília.

Parece-me desnecessário comentar os dois eventos, pois a edição 451/452 da revista Oomoto traz rica reportagem sobre eles, como também sobre outros, igualmente ligados à visita da Dirigente Espiritual, Kurenai Deguchi, do diretor-chefe da Oomoto, Sr. Kunihiko Shimamoto, de outras importantes pessoas e muitos membros da caravana – no total de 87 – que vieram do Japão especialmente para juntos festejar o jubileu de 80 anos da Missão-Oomoto no Brasil.

A Oomoto Internacia aniversaria, e com entusiasmo os esperantistas aqui residentes acompanham seu progresso durante esse primeiro ano, e expon-taneamente participam em seus eventos.

Parabéns ao Sr. Maeda e à equipe da Oomoto Internacia pelas suas atraentes reuniões de confraternização, realizadas durante todo o ano de atuação em Brasília!

Parabéns aos dirigentes da Oomoto espalhados pelo mundo todo, e aos seus membros, pelo incessante trabalho a favor de um fraterno entendimento mundial

Parabéns a nós, esperantistas, que podemos contar com o constante apoio de uma importante organização mundial, tal como a Oomoto!

## Gratulojn al Oomoto pro la relanço de la revuo

Emerson Werneck

**M**ia unua kontakto kun Oomoto estis dum la inaŭguro de ĝia internacia sidejo, ĉi tie en Braziljo. Mi estis invitita por legi en la portugala la tradukojn de la prelegoj de la japanaj eminentuloj. Esperanto estis utiligata kiel pontolingvo. En tiu punkto, neforgesebla pro diversaj kialoj, mi ne povis imagi, ke pli ol unu jaro poste, mi partoprenos en la relanço de la revuo "Oomoto Internacia".


Estis punkto de agrabla temperaturo en Braziljo, sed la varmo de la tie ĉeestantaj homoj, daŭra ekde la preparado en la mezo de la tago, kontrastis kun la stereotipa antaŭjuĝo, ke la japanoj estas timidaj kaj rezerviĝemaj. Tiam mi perceptis, ke tiu varmo estas, verdire, la marko de la rilato inter

Do, mi gratulas la anojn de ĉi tiu filozofio, pro la sindediĉo al la paca estonto de la homaro, kaj precipe pro la relanço de ĉi tiu gravega komunika organo, ĉar tiel la doktrino pri la frateco inter la popoloj kaj pri la konverĝeco de la religioj povos atingi ĉiujn landojn pere de Esperanto, kaj la idealoj de paco kaj unuiĝo pliproksimiĝas al sia realiĝo sur la planedo.

La tuta mistiko, inspirita de Dio al la unua fondintino, kiu, kvankam analfabeta, ekskribis la sanktajn tekstojn, jam indikis la destinon de la filozofio kaj altiris al si specialajn homojn, kapablajn allogi milojn da homoj, kiuj tuj fariĝis disvastigantoj de la samaj idealoj.

La monda laboro, iniciatita de Oomoto en Braziljo, ŝajnas rekta konsekvenco de Dia projekto, kiu enkondukos la lumon al ĉiu angulo sur la terglobo, pere de la perfekta komunikilo, la internacia lingvo Esperanto. Ĉi tiu fakto igas nin revii pri proksima estonto, en kiu ĉiuj homoj, fratiĝintaj unu kun alia, klopodos cele al disvastigado de la paco kaj de la bonaj novaĵoj de Dio, nin kreinta; ili komencos kompreni unu la alian en la logika konsento, dank'al la unuiĝo de la plej sublimaj religiaj ideoj en unu nura religio, komunikante pere de komuna lingvo elektita, tamen altrudita de neniuj.

Kaj hodiaŭ, t. e. unu jaron post la ekfunkcio en Braziljo, *Oomoto Internacia* jam estas parto de la vivo de ĉi tiu societo, kaj etendas sian kapablon al la tuta mondo. Pere de la relanço de la revuo, ĝi estos konata de ĉiuj aliaj landoj, kaj sendos sian mesaĝon de paco al ĉiuj homoj kun bona volo. Mi gratulas ĉiujn estraranojn de la movado, kiuj senlace laboras por pli bona estonto de la homaro!



Ĉe la fondokunveno de O.I. majstro ŝikanaj prezentas la teknikon de Aikido

la oomotanoj kaj la ĝenerala publiko. La religio kiu preĝas por la unuiĝo de ĉiuj mondaj religioj ja alproksimiĝas al la idealo de "homaranismo", akompananta Esperanton, neŭtralan lingvon. La homaro estas traktata kiel enorma grupo da gefratoj, ne en la estonto, sed jam en la estanteo.

## Parabéns à Oomoto pelo relançamento da revista

**M**eu primeiro contato com a Oomoto foi durante a inauguração da Sede Internacional, aqui em Brasília. Eu havia sido convidado para ler em português as traduções dos discursos das autoridades japonesas, feitas utilizando-se o esperanto como língua ponte. Naquela noite, inesquecível por diversas razões, eu não poderia imaginar que viria, mais de um ano depois, participar do relançamento da revista Oomoto Internacia.

Era uma noite de temperatura agradável em Brasília, mas o calor humano presente desde a preparação, no meio da tarde, contrastava com o estereótipo corrente de que os japoneses são tímidos e reservados.

Desde então tenho percebido que aquela calorosa recepção é, na verdade, a marca da relação entre os oomotanos e o público em geral. A religião que prega a unicidade de todas as religiões aproxima-se realmente do ideal de “homaranismo” que acompanha o esperanto, idioma neutro, desde seus primórdios. A humanidade é tratada como um enorme grupo de irmãos, não no futuro, mas já no presente.

Assim, parablenizo aos membros desta filosofia por seu compromisso com o futuro pacífico da humanidade, e especialmente pelo relançamento deste veículo de comunicação importantíssimo, pois assim a doutrina de irmandade entre os povos e convergência das religiões poderá atingir a todos os países, por meio do esperanto, e seus ideais de paz e união estarão mais próximos de se realizarem no planeta.

Toda a mística, inspirada por Deus à primeira fundadora, que sem saber ler passou a escrever os textos sagrados, já apontava para uma predestinação da filosofia, e trouxe pessoas especiais, com capacidade para atrair milhares de fiéis, que logo se tornaram propa-



Ĉe la fondokunveno de O.I. oomotanoj prezentas ĵongladon.

gadores dos mesmos ideais.

O trabalho mundial que a Oomoto iniciou em Brasília, no ano passado, parece ser consequência direta de desígnios divinos, que levarão a Luz a todos os cantos do globo, por meio do instrumento perfeito de comunicação, a língua internacional esperanto. Este fato faz-nos sonhar com um futuro próximo no qual as pessoas todas, irmanadas no propósito de espalhar a paz e as boas novas de Quem nos criou, possam celebrar o mútuo entendimento através do consenso lógico em fazer a conversão dos ideais religiosos mais sublimes em apenas uma grande religião, comunicando-se através de um idioma comum escolhido, jamais forçado.

E hoje, após um ano de funcionamento em Brasília, a Oomoto Internacional já é parte da vida desta sociedade, e expande seu alcance para todo o mundo. Por meio do relançamento da revista, será conhecida por todos os outros países, e enviará sua mensagem de paz a todos os homens de boa vontade. Parabéns a todos os dirigentes desse movimento, que incansavelmente trabalham para um futuro melhor para a humanidade!

## Ivo Lapenna: brila oratoro kaj talenta verkisto

Euripedes Barbosa

Ivo Lapenna naskiĝis en Jugoslavio, la 5-an de novembro 1909 kaj estis unu el la plej grandaj figuroj en la historio de Esperanto. En ĉiuj agadoj li montriĝis diligenta, persista, respondeca kaj inteligenta. Neniu povas dubi pri la eksterordinara signifo de Ivo Lapenna, precipe, en la esperanto-movado. Li estis brila oratoro kaj talenta verkisto en la Internacia Lingvo. Resume, mi povas diri, ke li dediĉis preskaŭ ĉiujn siajn fortojn al Esperanto.

Lapenna estis profesoro de internacia juro kaj internaciaj rilatoj en la Universitato de Zagreb, sed la plej grandan periodon de sia universitata kariero, de 1955 ĝis 1987, li laboris en la jura fakultato de la Universitato de Londono. La 15-an de marto 1988, la Londona Universitato celebris memorigan solenaĵon honore al la kompetenta profesoro. En 1949, oni elektis lin kunlaboranta membro de la Jugoslavia Akademio de Artoj kaj Sciencoj. Li verkis 12 librojn, pli ol 80 artikoloj en revuoj kaj li mem eldonis: "... Mi publikigis plurajn aliajn librojn, mallongajn monografiojn kaj proksimume 1200 plimallongajn artikolojn, dokumentojn kaj recenzojn pri juraj kaj aliaj temoj".

Ivo Lapenna eklernis Esperanton kiel memlernanto en 1928. Li estis kunfondinto de Studenta Esperanto-Klubo (poste Akademia Esperanto-Klubo) en la Universitato de Zagreb en 1929, kaj ĝia prezidanto ĝis aprilo 1941. Fondinto de Studenta Tutmonda Esperanto-Ligo (Stelo) dum la UK en Budapeŝto en 1929, kaj ĝia prezidanto ĝis la komenciĝo de la Dua Mondmilito. Li estis prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo de 1937 ĝis 1950; ĝenerala sekretario de UEA de 1955-1964; prezidanto de UEA de 1964-1974; fondinto de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj en 1957 kaj ekde tiam ĝia prezidanto, iniciatinto kaj dum pluraj jaroj redaktoro de ĝia organo Internacia Jura Revuo; membro de la Akademio de Esperanto ekde 1952; kunfondinto de Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado en 1980 kaj ekde tiam ĝia prezidanto; membro de la redakta komitato de la revuo Horizonte kaj ĝia ĉefa kunlaboranto; gvidanto kaj honora prezidanto de la Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz, Aŭstrio, 1987,

kun la starigo de la Jubilea Esperanto-monumento "La Espero".

Ivo Lapenna verkis plurajn librojn en la Internacia Lingvo, ĉiuj inspiritaj de humaneca internacismo. Jen la ĉefaj verkoj: *Retoriko* (la plej legata verko en la postmilita periodo); *Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj*; *Aktualaj Problemoj de Nuntempa Internacia Vivo*; *Hamburgo en Retrospektivo*; *Kritikaj Studoj*; *Juraj Terminologiaj Problemoj*.

Ivo Lapenna laboris ne nur por progresigi Esperanton, sed ankaŭ por la efektivigo de la revo de Zamenhof pri homa kunvivado en libereco, paco kaj interkompreno. Li agis senlace por prezenti Esperanton al la plej altaj instancoj, ekzemple al la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo, en 1954, kiam tiu organizaĵo agnoskis la valoron de Esperanto por la kulturo, scienco kaj edukado. Tio okazis dank'al la brila kaj vigla laboro de la "heroo de Montevideo".

Ivo akompanis atente la laborojn de Oomoto pere de la revuo de la sama nomo. Okaze de la 50-jara jubileo de Esperanto en la organizaĵo, en 1973, li sendis mesaĝon pri la afero, publikigita de la revuo Oomoto (julio-oktobro 1973), klarigante, ke "precize antaŭ duona jarcento Oomoto decidis enkonduki Esperanton kiel oficialan lingvon por siaj eksteraj rilatoj kaj internacia aktivado. Tio estas rimarkinda evento kun duobla valoro: unuflanke, la uzo de Esperanto sendube helpis al Oomoto diskonigi siajn kredojn kaj etikajn principojn vaste ekster la limoj de Japanio; aliflanke, tiu sama praktika utiligo de Esperanto por religia celo certe kontribuis al disvastigo de la Internacia Lingvo". "Mi deziras al Oomoto pluan sukcesoplenon laboron en la intereso de internacia kompreniĝo kaj amikaj, pacaj rilatoj inter la homoj".

Ivo Lapenna mortis la 15-an de decembro 1987, ĝuste kiam la tutmonda esperantistaro festis la centjariĝon de Esperanto kaj la naskiĝtago de ĝia iniciatinto, Lázaro Luiz Zamenhof, kiu venis al la materia mondo la 15-an de decembro 1859. Lapenna restis fidela al la zamenhofa idealo ĝis sia lasta spiro.



## Ivo Lapenna, brilhante orador e talentoso escritor

Ivo Lapenna nasceu na Iugoslávia, em 5 de novembro de 1909, e foi uma das principais figuras na história do esperanto. Em suas ações, mostrou-se cuidadoso, denodado, responsável e inteligente. Ninguém pode duvidar de seu extraordinário valor para o movimento esperantista. Ele foi brilhante orador e talentoso escritor na Língua Internacional. Posso dizer, em resumo, que Lapenna dedicou quase todas as suas forças ao idioma.

Foi professor de direito internacional e de relações internacionais na Universidade de Zagreb, mas o maior período de sua carreira universitária, de 1955 a 1987, ele trabalhou na Faculdade de Direito da Universidade de Londres. Ali, no dia 15 de março de 1988, prestaram-lhe honrosa homenagem. Em 1949, foi escolhido membro - colaborador da Academia de Artes e Ciências da Iugoslávia. Escreveu 12 livros e mais de 80 artigos para revistas. Sobre o assunto, ele mesmo acrescentou: “Eu publiquei muitos outros livros, pequenas monografias e aproximadamente 1200 pequenos artigos, documentos e críticas sobre temas jurídicos ou não”.

Autodidata, Ivo Lapenna começou a estudar esperanto em 1928. Ajudou a fundar o Clube Estudantil de Esperanto (depois, Clube Acadêmico de Esperanto), na Universidade de Zagreb, em 1929, e foi seu presidente até abril de 1941. Foi também fundador da Liga Estudantil Mundial de Esperanto, durante o Congresso Mundial de Budapeste, em 1929, e seu presidente até o início da Segunda Guerra Mundial. Tornou-se presidente da Liga Iugoslava de Esperanto, de 1937 a 1950. Foi secretário-geral da Associação Mundial de Esperanto, de 1955 a 1964, e presidente da mesma entidade no período de 1964 a 1974. Fez-se ainda fundador da Associação Internacional de Juristas Esperantistas, em 1957, elegendo-se presidente e, durante muito tempo, foi redator da Revista Internacional de Juristas Esperantistas. Elegeu-se membro da Academia de Esperanto, em 1952. Fundou o Centro Internacional do Movimento Neutro, em 1982, e desde então ocupou sua presidência. Foi membro da comissão de redação da revista Horizonte e seu principal colaborador.

Na cidade de Graz, Áustria, em 1987, organizou-se a Conferência Esperantista do Jubileu (100 anos do

Esperanto), cuja direção coube a Ivo Lapenna, também escolhido presidente honorário da citada conferência. Como parte das comemorações do jubileu, erigiu-se, naquela cidade, o monumento “A Esperança”. Ivo escreveu muitos livros na Língua internacional, todos inspirados no internacionalismo humanitário. Eis as principais obras: *Retoriko* (o livro em esperanto mais lido depois da segunda guerra mundial); *Discursos e Palestras Escolhidas*; *Problemas Atuais da Vida Internacional de Agora*; *Hamburg em Retrospectiva*; *Estudos Críticos*; *Problemas da Terminologia Jurídica*.

Lapenna trabalhou não somente para o progresso do esperanto, mas também para a realização do ideal de Zamenhof, ou seja, o convívio humano em liberdade, paz e entendimento. Ele agiu com o objetivo de apresentar o idioma às mais altas instâncias, por exemplo, à UNESCO, em Montevidéu, no ano de 1954, quando aquela importante entidade reconheceu o valor do Esperanto para a ciência, educação e cultura. Isso ocorreu graças ao trabalho brilhante e vigoroso do “herói de Montevidéu”. Ivo Lapenna acompanhou atentamente os trabalhos da Oomoto pelas páginas da revista também intitulada Oomoto, órgão oficial dessa organização religiosa. Por ocasião do jubileu de 50 anos de adoção do esperanto pela entidade, em 1973, ele mandou uma mensagem sobre o assunto, publicada pela citada revista, edição de julho-outubro de 1973, esclarecendo que “precisamente há meio século, a Oomoto decidiu adotar o Esperanto como língua oficial para suas relações exteriores e para os trabalhos internacionais. Isso é um evento digno de atenção com duplo valor: por um lado, o uso da língua ajudou, sem dúvida, a Oomoto a divulgar suas crenças e seus princípios éticos além das fronteiras do Japão; por outro lado, o mesmo uso prático do esperanto, com objetivo religioso, contribuiu para divulgar a língua internacional...” “Eu desejo à Oomoto pleno e continuado sucesso, no interesse da compreensão internacional e nas amigáveis e pacíficas relações entre os homens.”

Esse homem extraordinário morreu no dia 15 de dezembro de 1987, quando a comunidade esperantista mundial comemorava ainda o centenário da criação da língua e o dia do nascimento de Lázaro Luiz Zamenhof, que veio ao mundo no dia 15 de dezembro de 1859. Lapenna permaneceu fiel ao ideal de Zamenhof até o último suspiro.

